
# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 3 (858) ✪ 2006


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

שלום



Ŝalom'



# KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☏ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
☏ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
☏ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- ✪ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**



**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Storgatan 6 A,
S 153 30 Järna, Svedio;
☏ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR



Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
☏ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Ŝalom – en Roslagen | 51 |
| Du virinaj portretoj | 56 |
| Dum pli ol sesdek jaroj... | 58 |
| Interhelpo | 59 |
| La profilo – Pavel Polnický | 60 |
| Kiel studi fremdlingvon pere de Esperanto | 61 |
| Sekretaria jarraporto | 62 |
| Tagordo por la jarkunveno | 64 |
| Taskoj de kasisto kaj sekretario | 65 |
| Golfpilkoj ... aŭ pri prioritatoj en la vivo | 66 |
| Financaj raportoj | 67 |
| Informetoj | 70 |
| Nekrologo – Peter Hayward | 71 |
| Karmemore al Wim Koopmans | 72 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Ĉi-foje la revuo entenas raportojn pri la pasinta jaro de nia KELI kaj kelkajn tekstojn pri nia rilato al aliaj kunuloj kaj al nia tero. La ĉi-jara temo de nia kongreso ja temos pri naturo kaj progreso – kion toleri. Tio kompreneble ne ekskludas la progreson ĝeneralan en la socio kaj ties influon en niajn indivuduajn vivojn kaj interrilatojn. En la historio ni trovas multajn inspirigajn homojn kaj movadojn kiuj ŝanĝis nian socion – kion ili montras al ni hodiaŭ? Kie estas similaj semoj kaj plantetoj hodiaŭ, kiuj kreskos kaj fortiĝos? Ĉu ni vidos kaj rekonos ilin?

Pri nia KELI-movado ni havas alian problemon – mankas/os funkciuloj kiuj volas transpreni la taskojn por estonte gvidi kaj evoluigi la movadon. Ne hezitu anonci vian intereson antaŭ la jarkunveno!

# Ŝalom' - en Roslagen

Harry MÅNSUS
Tradukis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

שלום

Mi ripozas en la ĝardeno en norda Roslagen, [norde de Stokholmo]. Inter alie mi admiras miajn favoratojn en la gazono. Por mi la lekantetoj estas la simbolo de trankvila sed neregebla popola movado de sube, movado pri kiu mi revas kaj je kiu mi esperas. Pasintan semajnon mi kaptondis ilin per la herbtondmaŝino. Sed nun ili revenis kaj ŝajne floras kiel neniam antaŭe.

Vivo troviĝas en arbetoj kaj arbuskoj. La birdoj flugas kaj rapidegas por kapti manĝaĵojn por malfermaj bekoj. Du sciuroj ludas en la arboj. En la apuda beboĉareto dormas mia plej juna nepino. El la strando mi aŭdas la malproksimajn voĉojn de la cetera familio, plejparte la pli grandajn genepojn.


Mi ne kredas ke la sciuroj kaj la kornikoj estis oraj en Edeno, la paradizo, la origina kreaĵo. Tial mi kredas ke la mondo, kiun mi nun ĝuas, estas tiu, kiun la kreaĵa rakonto priskribas kiel *ŝalom'*, la hebrea vorto kiu signifas tutecon, harmonion, Wellbeing [bonfarton] kaj novan energion. "Wellbeing" [bonfarto] estas nova vorto por tio, kion la Biblio nomas beno. Kaj kiam mi kuŝas tie ĉi en mia Edeno kaj ĝuas kolorojn kaj odorojn, tiam mi estas en bona akompano. La pinto de la kreaĵa rakonto estas ke Dio mem ripozis kaj ĝuis de ĉiu zumanta vivo la sepan tagon.

Kvankam Dio estas flanke de mi, mi tamen sentas iom da difuza kulpo. Ĉu eblas ke homo en mia aĝo povas tie ĉi kuŝi, sin streĉi sub brilanta suno kaj bone farti – sen ion fari? En la aktujo atendas leteroj kaj paperoj siajn pritraktojn. Urĝaj projektoj sur la konstrugrundo ankoraŭ ne estas komencataj. Sed plej grave estas la penso pri la klientoj kaj pastradaj kontaktoj en Stokholmo. Multaj estas vunditaj kaj solaj. Ili vere ne povas ĝui la someron kaj la kunestadon kun la familio. Kelkaj el ili eĉ ne havas la

**H**arry Månsus, el kies libro mi tradukis la apudan tekston, estas finn-sveda pastoro en la baptista tradicio. Li fondis la Bromma-dialogon en Stokholmo kaj pro tio li ankaŭ konatiĝis pli vaste pro sia laboro fondi la dialogon inter tradicia kristanismo kaj la t.n. "New Age", sed samtempe retenante la necesan distancon.

La libro *Livet har en framtid* finiĝas per ĉapitro rubrikita "Dio kaj la globaliĝo (tutmondiĝo)". Tie la verkisto per bibliaj argumentoj montras la neceson de komuna kredanta fronto kontraŭ la detruiĝo de la kreaĵo kaj por la vivkondiĉoj de la homaro. Jesuo ĉiam staras flanke de la homo kaj religiaj formoj kaj tradicioj estas submetitaj sub la neceso de la amo.

Tradukita el la libro:
*Livet har en framtid.*
Harry Månsus (2001),
Libris,
ISBN 91-71



rajton renkonti siajn infanojn kaj genepojn.


Samtempe mi eklernas la malfacilan instruon ke neniu gajnas se mi malbone fartas en mia ripozloko. Kia maljusta la mondo eĉ estas, plej bone estas – ankaŭ por miaj klientoj kaj elĵetitaj kunuloj – se mi malrigidiĝas kaj ĝuas plene la lekantetojn, sciurojn kaj genepojn. Ju pli mi dum semajnfinoj liberiĝas de taskoj kaj transdonas miajn klientojn al Supera Potenco kaj mem reŝarĝigas miajn internajn bateriojn per la benata ŝalomfluo, des pli da ĉeesto, sekureco kaj energio mi povas doni dum la sekvanta semajno – kiam la teruraj ŝtormoj de la vivo atakas ilin.

Subite mi vidas kelkajn imponajn kreitaĵojn alte en la bluo. Estas grandegaj birdoj kiuj glitas tien kaj reen super Roslagen, ĝiaj arbaroj, kampoj kaj akvoj. Aspektas ke ili eĉ ne bezonas movi siajn flugilojn. Mi scias ke ili per siaj fortaj okuloj kapablas sekvi ĉion tie ĉi surtere. Ili vidas la leporojn, la arvikolojn ĉe vojrando kaj la birdetojn en la ĝardeno.

Sed samtempe ili konas multe pli grandan mondon. Ili vidas blankajn velojn kaj la ŝipojn al Finnlando survoje trans la Balta maro. Ili vidas aviadilojn forlasante la aerhaveno al celoj proksimaj kaj malproksimaj. Tiuj birdoj estas al mi simbolo de la duobla perspektivo de la ŝalomvizio pri la vivo.

Certe estas grave kio okazas sur la malgranda sceno de la vivo. En tiu ĉi momento mi estas sur ĝi kaj aŭdas la familion survoje reen de la marbordo. Estas mia tasko prepari la kafon. Momenton poste ni sidas, tri generacioj meze en la verdaĵo, kaj ni ĝuas sukon, kafon, kukojn kaj freŝajn spertojn de la strando. Kiel teologo mi scias ke ĝuste tiu ĉi daŭre bona vivo estas tio kion la Biblio nomas ŝalom'. Jes mi ne ekskludas ke Iu fakte malsuprenrigardas de sia alta ĉielo al la norda Roslagen kaj ripetas la vortojn de la momento de la kreaĵo: Imagu kiel bona estiĝis!

Sed ankaŭ la pli granda perspektivo estas decida pri nia vivo kaj nia estonteco. Kio okazas kun niaj lagoj kaj maro? Nur ĝui la refreŝigan baniĝon en brilantaj lagoj kaj en la Balta maro neas alian realecon. Ni ja scias ke tiuj ĉi akvoj nun sufoke serĉas oksigenon. Revenantaj raportoj priskribas la mortantajn profundojn de la Balta maro, kiu povas resaniĝi nur se la popoloj ĉe la Balta maro ekrespektos la delikatajn le ĝojn de la vivo. Ni ja



scias ke la birdoj, fiŝoj kaj fokoj kiuj ne nur baniĝas sed ankaŭ vivas en tiuj ĉi akvoj fartas pli kaj pli malbone jaron post jaro.

Unu el la plej bonaj aĵoj kiun mi scias estas unufoje jare forlasi Stokholmon celante la grekan insularon. Samtempe mi konscias ke unu el la plej gravaj homaraj demandoj nun estas: Kio okazas al la ĉiam pli malpura aero ĉirkaŭ ni – la sola kiun ni havas? Depost la genepoj alvenis, estas eĉ pli malfacile eskapi tiujn ĉi demandojn. Tial la ekstazo ĉe la marbordo estas miksita kun maltrankvileco kaj malgajo.

Plej profunde interne ni ĉiuj scias ke ni proprigis al ni mem vivmanieron kiun la globo ne kapablas porti. Se ĉiuj nacioj sekvus nin tiurilate la energio finiĝus kaj ĉiuj arboj de nia planedo malaperus post kelkaj jardekoj. La tutgloba varmiĝo baldaŭ havus nerevokeblajn sekvojn. Ĉi tion la mediaro fiksigis en nian konscion.

Sed kiu havas la fortojn elteni tiujn konojn konsciante? Pro tio la indiferentiĝo, nego kaj diversaj eskapoj estas la nuntempaj defendmanieroj. La sekvo estas ke la nekonsciaj tavoloj de nia personeco pleniĝas de mistika malripozado, maltrankvileco kaj ekzista angoro. Tiuj ĉi angoro kaj maltrankvileco ne estas malsanoj, sed febraj signaloj de unu ĉiam pli patologia evoluo de la socio. La minacata vivo de la kreaĵo havas sian aliancanon ene de ni ĉiuj, unu sentema sentocentro kiu vokas al pripensado kaj konvertiĝo kiam ankoraŭ restas tempo. Tiuj ĉi internaj signaloj atentigas nin pli kaj pli forte ke ni riskas perdi la profundecon, la signifon kaj la celon de nia ekzistado surtere.

Kompreneble la interna maltrankvileco kaj la angoro povas peli nin en febrajn agadojn, histeriajn travivaĵojn, kreskantajn konsumadon kaj drinkadon aŭ aliajn manierojn de eskapoj. Sed sub feliĉaj steloj ĝi povas iĝi ankaŭ krea kaj revolucia forto kiu gvidas la socian evoluon kaj la historion en novan sulkon. Tio jam okazis plurfoje en la formo de popolaj movadoj, reformacioj kaj religiaj movadoj. Kiam ajn estas tempo por tia movado.

Memkompreneble tiaj erupcioj de la profundeco de iu popolo kaj kulturo ne estas supraĵaj kaj agrablaj okazaĵoj. Kontraŭe, ili tuŝas la profundan tavolon de kuŝantaj sentoj kaj forpuŝataj angoroj – akceptante la realecon kiel ĝi estas! Mi ellevos movadojn kiuj naskiĝis el tiuj profundoj, kiuj travivis ”la malhelan nokton de la animo” kiel la mistikuloj sin esprimas. Tial ili posedas la forton rompi historiajn, rigidajn kaj fermitajn situaciojn kaj malfermi pordon de espero al la estonteco.

...

Por tiu kiu neniam travivis nordan printempon eble similas al fabelo en januaro ke sur tiuj frostitaj kampoj baldaŭ estos maro de verdaĵoj. Tamen ni norduloj scias ke kiam la tempo estos preta, la blanka tapiŝo de anemonoj malvolviĝos ĉie en nia lando. Ankoraŭfoje la lumo kaj la vivo venkos la mallumon, la malvarmon kaj la morton.

Estas eĉ pli malfacile kredi je printempo kiam la silento kaj la malvarmo venkis en la vivo de homoj kaj rilatoj, precipe se alkoholaĵoj kaj drogoj superis sanktajn decidojn. Tamen ni povas

vidi milionojn da homoj kiuj sin levas el mallumo, malvarmo kaj morto. Per la 12-punkta programo de Anonimaj Alkoholistoj ili ekkonis pli superan potencon, kiu ne nur deziras blankajn anemonojn printempe – sed virojn kaj virinojn, kiuj sin retiras el la hontiga kaj humiliga lando.

En animtrankvila diservo por la 12-punkta popolo mi sidis vid-al-vide kun la rezulto de tiu nevidebla forto. La altarringo ĉirkaŭpleniĝis kiam oni disdonis la Sanktan Manĝon. Plurajn homojn el ili mi jam renkontis kaj mi konas kiel estis ilia vivo. Unu viro pasigis trionon de sia vivo en malliberujo, unu virino fordrinkis sian plenkreskan vivon kaj du junaj virinoj dum jaroj estis prostituitinoj. Vidi ilin tie starante, denove en plena florado, estis por mi pli forta atesto pri la venko de la vivo ol la norda printempo. La mallarĝa pordo al nova estonteco, kiun tiuj ĉi personoj trapasis, estas promeso pri io pli granda – popola liberiga movado desube.

Estas kreda injektaĵo vidi kiel homo releviĝas kaj resaniĝas per kunlaboro kun pli alta potenco – en animtrankvilaj diservoj, en kuracigaj domoj kaj en grupoj ekster la ekleziaj muroj. Estante teologo mi rekonas tiun liberigan potencon. Tiel iam en la historio ĉio komenciĝis – ĉe suferanta kaj humiligita popolo en Egiptujo.

Same kiel miaj pacientoj ankaŭ ili ne havis pretan imagon pri Dio kaj teologio kiam ili dorse estis vipe frapataj. Malgraŭ tio, tiu forto atentas la voĉon de elĵetitaj homoj. Martin Luther King asertis ke ĉiu homo estas bildo laŭ Dio kaj neniu estas naskita al humiliĝo pro sia haŭta koloro. Kiam la nigruloj en la Sudo opiniis ke nenio estas ŝanĝebla, kaj aludis la ekonomian kaj politikan fortojn, King respondis: La plej granda forto de la vivo estas sur nia flanko!

Ankaŭ la Dio de la 12-punkta programo estas forto kiu batalas por ni kiam ni mem ne plu povas batali. Forto kiu neniam finas fidi je ni – ankaŭ dum momentoj kiam ni mem ne eltenas vidi nian bildon en la spegulo.

Mi akompanis la kvaropon ĉe la altarringo partvoje tra la valo de densa mallumo. Ili suferis de kulposentoj kaj honto ĝis finfine la sonoro atingis iliajn sekretajn ĉambretojn en la koro – ke ni ĉiuj estas la bildoj laŭ Dio kaj neniu monstraĵo ĝis nun elformiĝis de la mano de la Kreinto.

Antaŭ iom da tempo mi troviĝis en interparolo kun viro kiu scivolis pri kio tiu ĉi libro temas. Mi iom malcertiĝis, la buŝo sekiĝis kaj mi serĉis la vortojn, ĉar tiu viro ja estis ĉefo de konata internacia entrepreno.

– Pri la sekvoj de la tutmonda ekonomio rilate al niaj vivoj kaj nacioj – mi respondis sondante – sed mi kortuŝiĝis de lia respondo.

– Mi mem estas iom disduiĝinta pri investi mian vivon en mia nuna laboro. Estas timige rigardi kiel kurtatempaj gajnoj estas la gvidsteloj por grandaj entreprenoj. Mi estas konvikita ke la plej multaj ordinaraj akciŝparantaj homoj malaltiĝus siajn postulojn de gajno se ili scius kiajn negativajn sekvojn por la mondo longtempe havos la entreprena manko de socia respondeco.

Subite mi ekkomprenis ke mi ne parolis kun malamiko sed neatendita partnero. Tiaj interparoloj fortigas mian kredon ke la Vivo havas aliancanon en ĉiu homo. Mi kredas ke la plejmultaj sentas kreskantan maltrankvilecon pri tio, kien la malnova paradigmo kaj la ne laŭtempaj paroloj direktas la socian evoluon.

Samtempe estus krudaĉe instigi personojn forlasi la malnovan manieron – meze de kulturo de kontrolado, prestiĝo kaj konkurenco. Ni ĉiuj bezonas kunligon kun repaciga lumo kun niaj vivoj por ke ni kuraĝu montri niajn mankecon kaj neperfektecon kaj malfermi nin por resaniĝo. La homoj ĉe la altarringo trovis siajn novajn vivojn en tiaj repacigaj medioj.

Estis la laborista movado, la liberreligia movado kaj la kontraŭalkohola movado kiuj ŝanĝis Svedion kaj konstruis nian demokracion. La lastajn jardekojn la privatreligeco, novreligia movado kaj la 12-punkta movado donis al ni novajn formojn por resaniĝo kaj rehonoriĝo. La estonteco faru ke vivigaj kapeloj, popolaj domoj, sanulejoj kaj 12-punktaj grupoj estu la humo kie nova popola movado kresku kaj ŝanĝu niajn vivkondiĉojn!

Miaj geamikoj en la animtrankvila diservo jam trapasis la mallarĝan pordon al kiu la okcidentaj homoj nun alproksimiĝas. Kiam la realeco kaptos nin, la eskapo ne plu eblas. Ni ne plu povas negi ke la konsuma kulturo kaj kredo je la sava forto de la ekonomia kreskado minacas la vivon de nia planedo kaj la futuron de niaj infanoj. Ni devas kliniĝi je tiu vero, kiun ni ĉiam sentis interne sed timigas nin kaj dolorigas – ke ni mensogis al ni mem, ke eblas kontroli la vivon per teknikaĵoj kaj geniaj strategioj.

Per sia kruda lingvouzado la 12-punkta popolo diras ke “la Reĝo”, tio estas niaj troigitaj egooj, devas malsuprengrimpi de la trono kaj esti parto de la homaro. Por ke la vivo havu estontecon sur tiu ĉi brilanta perlo en kosmo, necesas fari ĝuste tiel – ekkoni nian senpotencon kaj niajn bezonojn de novaj valoroj kaj spirita forto kiuj povas liberigi nin de la malliberujo de egoismo. Kaj tiam, starante antaŭ la pordo de la vivo kaj streĉante niajn manojn petante helpon, ni trovos ke la plej granda forto de la ekzistado estas sur nia flanko.

El *Preĝo por ĉiu tago* de Jelly Koopmans-Schotanus.



16-AN DE JUNIO

Kompatema Dio, helpu min labori por la paco en la mondo, en la lando, en la urbo, en la eklezio, en la familio kaj en mia propra koro!

# Du virinaj portretoj

Jacques TUINDER, NL

## Ŝi restis fidela al senperforteco... Coretta King

La 31-an de januaro mortis en Usono Coretta King (1927 - 2006). Kune kun sia en 1968 mortigita edzo Martin Luther ŝi ludis gravan rolon en la batalo por samaj civitanaj rajtoj kaj kunvivado pli justa kaj paca. Apopleksio kaj koratako, okazintaj en aŭgusto 2005, forte plimalbonigis ŝian sanstaton. De el kliniko en Meksikio, kie ŝi restadis la lastan tempon, ŝi meze de januaro ankoraŭ faris surprizan viziton al la Atlanta M.L.King Centro, kiun ŝi estis fondinta. Sidante rulseĝe ŝi afable kaj ridetante ĉirkaŭrigardis, sed ne plu kapablis paroli. La ĉeestintoj spontane regalis ŝin per ovacio staranta!

Coretta ekkreskis en Perry County (Alabamo), kie ŝia patro estris kamparanan butikon, benzinstacion kaj transportentreprenon. Ŝiaj forto kaj decidemo jam junaĝe evidentiĝis. Ŝi estis la dua nigra studentino en la historio kiu vizitis la Ohian Kolegion; la fratino ŝin antaŭis. Danke al stipendio eblis al ŝi ekstudi en konservatorio. Tie ŝi ekkonis junan pastoron, kiu studis filozofion kaj poste fariĝis ŝia edzo.

La 18-an de junio 1953 okazis la nupto-ceremonio. Ili reiris por unu jaro al Bostono por fini la studon. Poste ili eklogîs en Montgomero, kie Martin komencis pastori en baptista komunumo. Novembre 1955 naskiĝis la unua infano, Jolanda Denise.

La aŭtobusbojkoto sekve de la aresto de Rosa Parks, kiun organizis la nigraj gvidantoj en Atlanto, faris Martin en aĝo 27-jara unu el la unuaj kaj ĉefaj protestintoj. Akompane de Coretta, lin ade subtenanta, li fariĝis la fama senperforta batalanto por civitanaj rajtoj por la nigra enloĝantaro en Usono. "Mi estas konvinkita pri tio, ke se mi ne havintus tiom fortan, senŝancelan kaj trankvilan edzinon, mi neniam povintus elteni la streĉojn kaj afliktojn kiujn ofte postulis la movado," li poste skribis.

Post la morto de la edzo je la 4-a de aprilo 1968 tri temoj ludis centran rolon en ŝia vivo: la zorgo pri la kvar infanoj, la starigo de Kontraŭperforta Centro por daŭrigi lian laboron kaj la okazigo de ĉiujara rememoriga tago. Daŭris tamen pli ol dek jarojn antaŭ ol prezidento Ronald Reagan fine de 1983 subskribis la leĝon, kiu ebligis ekde 1986 ĉiujare je la tria lundo de januaro celebri Tagon Rememoran pri Martin Luther King.

Karakterizis la gvidantinecon de Coretta neelĉerpeblaj ĉarmo, gajeco kaj decidemo. Estas konate, ke ŝia pensado pri senperforteco estis daŭra kaj konsekvenca. Eĉ meze de akraj konfliktoj ŝi restis inda kaj afabla. Ŝi ĉion kompetente kaj profunde pripensis.

En 1994 ŝi transdonis la gvidadon de la King Centro al sia filo Dexter (1961), kies frato Martin III (1957) parte transprenis tiun taskon en 2004. La filino Jolanda (1955) fariĝis aktorino kaj la alia filino, Bernice (1963),

preferis la profesion de sia patro kaj plenumis pastoran funkcion.

Tute laŭ la spirito de la edzo Coretta ade kaj ade emfazis, ke la plej profunda kaŭzo de la mizero en la mondo estas la triobla malbono de rasismo, malriĉo kaj perforto. Pri la laboro de la Asocio de Repaciĝo ŝi diris, ke estas la kuraĝa sindediĉo al la liberigo de la homaro de ĉi tiuj malbonoj kiu avangardigis la senperfortan batalon por paco kaj justeco. Dum la lastaj vivojaroj ŝi klare kaj kulpige protestis kontraŭ film- kaj televido-kompanioj, videobutikoj, armilindustrio kaj fabrikistoj de perfortaj infanludiloj.

Simile al Martin Luther, Coretta Scott King estis homo kun revo. Plej dece oni ŝin honoru alproksimigante la vizion de Paca Kunvivado, por kiu ŝia edzo mortis kaj ŝi mem batalis, ke tiu revo ne perdiĝu!

---

## Ni neniam forgesu ŝin! Rosa Parks

Kiu ne konas ŝian nomon? Rosa Parks (1913-2005), la usona aktivistino sur la kampo de porcivitanaj rajtoj? Ŝi estis la virino, kiu motoris la pezan kaj komplikan batalon por samaj homrajtoj favore al la nigra enloĝantaro de Usono.

La 1-an de decembro 1955 ŝi rifuzis forlasi sian sidlokon en la ankoraŭ malplena mezparto de aŭtobuso en Montgomero, kiam blankulo volis eksidi ĝuste tie. La leĝo en la ŝtato Alabamo diktis, ke en tia kazo la nigraj pasaĝeroj prenu lokon en la busmalantaŭo aŭ simple ekstaru.

Rosa Parks, kiu jam dum jaroj uzis tiun buslinion de el la urbocentro - kie ŝi laboris kiel kudristino en grandvendejo - estis laca kaj suferis je doloraj piedoj. Tiun tagon ŝi ne volis ŝanĝi sian sidlokon. Oni vokis la policon, kiu postulis punpagon de dek dolaroj. Kiam ŝi decidis ne pagi ĝin, oni arestis ŝin. Sekvis, kompreneble, proceso.

La gvidantoj de la nigra komunumo en la urbo, kiuj konis Rosa Parks, ĉar ŝi jam kelkajn jarojn aktivis kadre de movado por civitanaj rajtoj en Montgomero, alvokis al aŭtobusbojkoto proteste kontraŭ tiu formo de rasodiskriminacio. Amase la nigra enloĝantaro rifuzis ekde tiam uzi la busojn. Tiu agado daŭris tutan jaron kaj preskaŭ rezultigis la bankroton de la busentrepreno.

Dume la proceso kontraŭ Rosa Parks alvenis ĉe la Usona Supera Tribunalo. Ĝi pravigis ŝin, klarigante la apartigon inter blankuloj kaj nigruloj kontraŭkonstitucia.

Komence de la sesdekaj jaroj Rosa Parks transloĝiĝis al Detrojto, kie ŝi restadis ĝis sia morto. En la jaro 2004 evidentiĝis el medicina raporto ke ŝi ekdemencas. Jaron poste, la 24-an de oktobro 2005, ŝi mortis en la dormo je 92-jara aĝo. Kiel unua virino en la historio de Usono ŝian korpon oni katafalkis en la Kapitolo; granda honoro kiu kutime fariĝas nur al prezidentoj kaj militherooj.

La 2-an de novembro 2005 okazis rememoriga ceremonio, dum kiu parolis inter aliaj ankaŭ eksprezidento Bill Clinton.

Resume de Éva FARKAS-TATÁR, HU
pri prediko de József Farkas

# Dum pli ol sesdek jaroj...

predikis kiel hungara reformita pastoro József (Jozefo) Farkas ĝenerale en Hungario. Inter la jaroj 1948 kaj 1999 li estis pastoro de malgranda budapeŝta komunumo, kien multaj homoj venis en la postmilitaj mizeraj tempoj por aŭskulti mesaĝon de Dio, ricevi konsolon kaj kuraĝigon. Du-tri fojojn jare okazis evangelizadoj, kiuj ofte estis ŝoke modernaj, kaptivaj, kiuj haltigis, pripensigis kaj konvertis plurajn homojn.

El tiuj famaj prediko-serioj ni eldonadas en la lastaj jaroj kaj ni konstatas, ke ili ankaŭ nun estas tre aktualaj. La unua, kiun ni aperigis, havas la strangan titolon: Pneumatosfero, kun la subtitolo: La helpema spirita mondo.

Li agnoskas, ke gigantoj vivis antaŭ ni en la dudeka jarcento: atomfizikistoj, astronomoj, medicinistoj. Grandaj psikologoj pli multe malkovris pri la homo ol iam ajn antaŭe.

Ili asertis, ke sub nia konscia tavolo mirinde riĉa mondo kaŝiĝas kun propraj leĝoj. – Sed el siaj malkovroj ili tion deduktis, ke la homo estas determinita kaj nur iluzio estas la libereco de lia volo. Senindulge efektiviĝas la leĝo. Oni parolis pri trispeca fato: la fato de la korpo, iu heredaĵo, kiun oni ne povas haltigi, – dua estas la psika fato laŭ kiu la plej fruaj psikaj efikoj jam stampas nin kaj ne refuteble elformas nian personecon. Trie oni kutimas mencii la socialan faton. Tio, ke ni vivas en ĉi tiu epoko, lando, urbo, familio fatale determinas nian vivon. Resume oni tion deklaris, ke la homo fariĝis kaj fariĝos tiu, je kiu la malantaŭaj, fonaj fortoj lin elformas. Nia pastoro diras:

*Kun la aŭdaco de la kredo mi aldonas tion, kion Dio deklaras al la etuloj "...malkaŝis al infanoj"(Mat. 11:25-26). Mia konfeso estas: oni ne devas neglekti tiujn fortojn, kiuj de ekstere puŝadas, devigas la homon ien, sed lia digno estas tamen, ke li povas atingi – malgraŭ siaj katenoj, iun veran liberecon. La gigantaj scienculoj ne vidis, ke la Spirito de Dio ŝvebas super la Kaoso. Ankaŭ tiu fona medio elradias sian forton kaj efikas. – Por nomi ĉi tiun malantaŭan forton mi faris tiun novan vorton: pneumatosfero. Ni konas ĉirkaŭ ni la atmosferon, la stratosferon eĉ supre la jonosferon. Simile al ili ekzistas kaj ŝirme ĉirkaŭas nin tiu pneumatosfero. Pneuma estas la greka vorto en la Biblio por la Spirito. La Spirito de Dio ŝvebas super la abismo kaj tio okazas ankaŭ nun, same kiel okazis en la aŭroro de la kreado.*

*Principa peno de la moderna vivo estas, ke la homo sentas sin en malplena, indiferenta mondo inter sekaj leĝoj. En tio li angoras, timas, kuradas kaj bruas por iel elteni ĉi tiun dezerton. Al tiu moderna homo sonas la mesaĝo: ekzistas pneumatosfero! Ne transdonu vin al tiu fascino, ke vi estas orfa, subigita, senpova! La Spirito de Dio ŝvebas ĉirkaŭ la universo. El ĉi tiu sfero eblas preni helpajn, sanigajn fortojn. Ne en indiferenta, malplena universo okazas via vivo, sed en la brakumo de bonvolaj, helpemaj fortoj!*

# Interhelpo


MU Binghua, Ĉinio

Antaŭ ol fariĝi fama kantostelulo, li estis tre embarasata. Neniu sondiska kompanio volis helpi lin fabriki sian sondiskon. Lia vivo estis tre malfacila. En ĉiu tago li devis manĝi nur dufoje kaj iam eĉ devis ankaŭ peti monhelpon de la gepatroj aŭ amikoj.

Iun tagon, kiam li estis transiranta kruciĝejon, baris al li la vojon unu maljunulo, kies dorso estis ĝiba kaj kiu pro tio apenaŭ povis stari firme.

– Junulo, ĉu vi volas helpi min por ke mi iru trans la vojon?


Tiutempe, li efektive havis malbonan humoron, ne interesiĝis pri ajna afero, vere intencis sin turni por tuj forlasi lin kaj li ne volis atenti la maljunulon. Sed, li vidis lin fakte kompatinda; finfine li, subtenante per mano la maljunulon je la ŝultro, malrapide pasis tra la vojo plena de hastaj irantoj kaj veturantaj aŭtoj.



– Ĉu vi eksentis, ke nun via animstato pli faciliĝas ol en la ĵus pasinta momento, junulo? lin demandis la maljunulo kun rideto.

– Nu! Jes... Nun mi sentas min bonhumora!

Li vole nevole konfesis, ke post la helpo al aliulo lia animstato estas pli facila kaj ke li gustumis la plezuron helpi malfortan grandaĝulon.



En ĉi tiu momento, la maljunulo subite rektiĝis, kaj ankaŭ lia korpo fariĝis fortika kaj solida. Tio tre surprizis la junulon. Li balbutis demandon:

– Sinjoro maljunulo, vi...

– Efektive mi estas tre sana, sed mi ĵus vidis, ke vi havas malgajan mienon kaj sekve decidis helpi vin. Se homo en malfavora situacio preferas helpi aliulon, kiu estas en pli malfavora situacio ol li, do estas certe ke la helpemulo ofte povas malpezigi sian suferon. Tial, ĵus antaŭ vi, mi do ŝajnigis min ĝiba kaj iom lama je ambaŭ piedoj. Mi esperas, ke mi jam atingis mian celon, sed samtempe ne mirigis vin.

– Ne estu tro maltrankvila! Ĉio nepre estos pasinta ĉiam. Dio kapablas ĉiam kaj ĉie vin trakti tre juste!


Fininte siajn vortojn, la afabla maljunulo malaperis inter la preterirantoj.

# ESTRARANO KAJ KONGRESORGANIZANTO

Pavel POLNICKÝ

Dum la plej terura dua mondmilito mi eniris (10.4. 1943) tiun-ĉi mondon, kiel dua el kvin infanoj en la familio. Patro estis librobindisto kaj patrino (kudristino) zorgis pri hejmo kaj familio. Kiel 10-jara knabo mi perdis (post akcidento) videblecon de mia maldekstra okulo kaj tio limigis mian decidon pri mia profesio. Kuracistoj rekomendis studadon, sed en Poděbrady tiam ekzistis nur gimnazio kaj agrikultura lernejo, do mi elektis tiun duan. Dum mia laborperiodo mi laboris en diversaj funkcioj.

En la jaro 1971 mi edziĝis, ni konstruis preskaŭ propramane domon, venis tri infanoj kaj kiam ili jam estis plenkreskaj decidis mia edzino, ke ŝi jam ne volas vivi kun mi kaj ni en la jaro 1996 divorĉis. Mi devis vendi domon kaj feliĉe mi tuj sukcesis aĉeti alian dometon, kiun firmao rekonstruas (nuntempe espereble jam finigos). La jaro 2004 estis tre grava por mia vivo. Mi denove edziĝis, fariĝis pensiulo kaj translokiĝis al nova domo.



Tute hazarde mi eksciis pri kurso de Esperanto en Poděbrady (1964) kiun mi partoprenis kaj de tiam E. fariĝis parto de mia vivo. Tuj mi komencis aktivi en junularo kaj kiam en la jaro 1969 estis renaskita Ĉeĥa E-Asocio mi ekfunkciis kiel profesia sekretario. Sed bedaŭrinde mi devis foriri en la jaro 1974 pro politika kialo – mi rifuzis eniri komunistan partion. Tiam mi estis longe ekster la E-movado, tamen mi gvidis infanan rondeton en lernejo, ni vizitis kelkajn orientajn landojn kaj ekzemple dum UK en Budapeŝto miaj infanoj transdonis florojn al nove elektita estraro de UEA (1983). Post la ŝanĝoj en nia lando oni tuj invitis min denove labori en la ĉeĥa asocio kaj ĝis nun mi estas sekretario kaj kontisto. Sidejo de nia asocio estas en mia domo. Mi kunlaboris kiel kasisto dum kongresoj de IFEF en Olomouc, SAT en Strážnice kaj dum UK en Praha 1996, se mi menciu nur tiujn plej gravajn. Dank' al Esperanto mi vizitis plej multajn eŭropajn landojn kaj ankaŭ Usonon


De infanaĝo mi partoprenis regule vivon en nia loka paroĥejo de Českobratrská církev evangelická (Evangelia Eklezio de Bohemia Kunfrataro). De la sepdekaj jaroj ĝis nun mi estis presbitero. Kompreneble mi baldaŭ eksciis pri ekzisto de KELI kaj jam en la jaro 1967 mi partoprenis kongreson en itala Torre Pellice kaj de tiam mi ofte estis kongresano. Post la morto de prof. Horský mi estas prezidanto de nia ĉeĥa KELI sekcio, mi organizis jam du-foje KELI kongreson en nia lando (2000 Janské Lázně, 2004 Bystřice p. Hostýnem) kaj kun multaj el Vi mi renkontiĝos ankaŭ ĉi-jare en STRÁŽNÉ. De la pasinta jaro mi prizorgas presadon kaj dissendadon de nia gazeto DIA REGNO.

**Bonvenon en Ĉeĥio!!!**

# Kiel studi fremdlingvojn pere de Esperanto kaj la Biblio

Eblas studi fremdlingvojn pere de la Biblio kaj Esperanto en la interreto. Ĉe la retpaĝo www.crosswire.org/study/parallelstudy.jsp de Croswire Biblio-Societo eblas kunmeti dulingvajn (aŭ trilingvajn, aŭ eĉ kvarlingvajn) Biblio-tekstojn laŭ deziro. Pli bone, Esperanto estas unu el la proponitaj lingvoj. Tiel, ekzemple, oni povus starigi anglajn kaj Esperantajn Biblio-tekstojn flanke en du kolumnoj sur la sama paĝo. Do angla-Esperanta teksto aspektus jene:

http://www.crosswire.org/study/parallelstudy.jsp?add=Esperanto#cv


**Parallel Viewing: James 1:19**

Parallel viewing allows you to see two or more texts side by side. For example, you could view two Bible versions of the same verse next to each other, or a verse from a specific translation and what a commentary has to say about that specific verse.

previous chapter next chapter

| "Esperanto Bible (Esperanto)" | "Bible in Worldwide English (BWE)" |
|---|---|
| **1** Jakobo, servisto de Dio kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo, al la dek du triboj, kiuj estas dispelitaj:Saluton! | **1** I am James. I am a servant of God and of the Lord Jesus Christ. I send greetings to all of God's people wherever they live. |
| **2** Rigardu cxion kiel gxojigan, miaj fratoj, kiam vi falas en diversajn tentojn, | **2** My brothers, be very happy when you are tested by having troubles of many kinds. |
| **3** sciante, ke la provado de via fido faras paciencon. | **3** You know this, that when you prove you believe, you become stronger to take troubles. |
| **4** Kaj la pacienco havu sian perfektan faradon, por ke vi estu perfektaj kaj kompletaj, ne havante mankon. | **4** But you must keep on being strong to take trouble. Then you will be all right in every way. You will not need anything more. |
| **5** Sed se al iu el vi mankas sagxeco, | **5** If any of you need to be wise, ask |

Oni povas kunmeti diversajn lingvojn laŭplaĉe, ekzemple, germane-Esperante, germane-ruse-Esperante, germane-france-ruse-Esperante, ktp. Kaj ankaŭ eblas elprinti la tekstojn en konvena formato por pli facila legado kaj komparo.

Por mi tio estas ne nur elstara metodo por pli bone konatiĝi kun la Biblio, sed ankaŭ por studi fremdlingvojn pere de Esperanto. Alternative, oni povas uzi la nacilingvajn tekstojn por pli bone lerni Esperanton, aŭ por fari komparon inter la diversaj tradukoj. Mi konsilas al vi, mem provi ĝin.

Jerald VEIT

# SEKRETARIA JARRAPORTO PRI LA JARO 2005

Kompilis Els van DIJK-KUPERUS, NL

Estas la tago post la Pasko kaj mi komencas verki mian jarraporton. Rigardante tra la fenestro mi vidas arbojn kun novaj folietoj, florantajn tulipojn kaj narcisojn en mia ĝardeno. La printempo estas finfine klare videbla en la naturo.

La nova jaro komenciĝis antaŭ pluraj monatoj. Plurloke sur nia terglobo aktivas KELI-anoj. Iuj eble aniĝis antaŭ nelonge. Ni ĉiuj ricevas denove ŝancon por diskonigi Esperanton kaj KELI Ĉu ni uzas tiujn novajn eblecojn dependas de ni ĉiuj. Se mi konsideras la membro-liston, la kongresemulojn kaj la ĝis nun vanan serĉadon de novaj estraranoj, mi estas pesimisma pri la plua ekzistado de nia unuiĝo. Se vi pristudas la deĵorperiodojn de la estraranoj, vi rimarkas, ke mia deĵorperiodo finiĝos en 2007 kaj tiu de la kasisto en 2008. Tiuj jaroj do montras la neceson serĉi du novajn funkciulojn nome: sekretarion kaj kasiston, ĉar ni ambaŭ ne estos reelekteblaj.

La elektronika poŝto plifaciligas la mondvastajn kontaktojn kaj la informado per la interreto fariĝas la plej grava propagandilo. La ttt-paĝo de KELI estas www.chez.com/keli

La raporto mallongiĝis dum la lastaj jaroj pro manko de informoj.

La nova redaktoro de Dia Regno, Bengt Olof Åradsson sukcesis redakti interesan membro-organon kun nova fasonado, kiu estas presita en Ĉeĥio. Pavel Polnický regule dissendas ĝin. Redaktoro ne povas sola plenigi revuon, tial estas viaj kontribuoj (ankaŭ fotoj) bonvenaj.

KELI estas leĝe registrita en Nederlando ĉe la Ĉambro de Komerco, ĉar la banko (Postbank) estas en Nederlando kaj la sidejo de KELI estas laŭ la statutoj en la lando de la sekretario.

Tiu situacio devigis min plurfoje trakti leĝajn kaj financajn aferojn. Mi sekvis inter alie simpozion de la Ĉambro de Komerco pri la financaj kaj impostaj devoj de unuiĝo en Nederlando. Krome mi konsultis spezokonto-specialiston. Mi do plenumas taskojn, kiuj ne apartenas al la sekretariaj devoj pro la fakto ke la kasisto ne loĝas en la lando de la banko kaj leĝa enskribo. Nova sekretario kaj kasisto loĝu aŭ en la sama lando aŭ en du ne-samaj landoj kun enskribo en la lando de la kasisto.

**ESPERANTO-MISIO** ne plu funkcias. La provizo de la Biblio en Esperanto, eldonita antaŭ 2½ jaroj, rapide malgrandiĝas. Estas planoj por nova eldono de pli granda provizo.

**BRITIO.** Dank'al Tom Neil aperis la



I. BAGI, B. REHM, P. POLNICKÝ, P. COUSSON, E. v. DIJK,

membro-organo *Kristana Alvoko* plurfoje en 2005. En Skotlando okazis ekumena diservo kadre de la centjara festkongreso de la Skota Esperanto-Asocio. Ĝin gvidis pastro Charles Dornan (I.K.U.E.). En Britio ne plu okazis la regulaj diservoj en Esperanto. Ankaŭ la lasta, en Londono, finiĝis pro manko de partoprenantoj.

**BULGARIO.** Ekde la Ekumena Kongreso en Piliscsaba ni havas denove reprezentanton en Bulgario nome: s-ino Ivanka Stoyanova. Ŝi dissendas *Dia Regno*-n al la membroj.

**ĈEĤIO.** KELI sekcio funkcias kadre de la Ĉeĥa E-Asocio kiel jure memstara subjekto. Prezidanto de la sekcio Pavel Polnický estas samtempe sekretario de ĈEA. Li kelkfoje jare dissendas sekcian informilon al ĉiuj 17 membroj. El tiuj 11 ricevas *Dia Regno*-n.

**FINNLANDO.** Olavi Kantele dissendis kaj kompilis membro-cirkuleron plurfoje jare. Kasistino estas Soili Salminen. La printempa kunsido de la finna sekcio okazis en Turku sabaton 12.03.2005 dum la Vintraj Tagoj de la finna Esperanto-Asocio. Je dimanĉo oni okazigis matenpreĝon. La membroj en septembro kunvenis en Svedio, denove kadre de la Aŭtunaj Tagoj de svedoj kaj finnoj.

**GERMANIO.** Okazis pluraj diservoj. Kadre de la Germana Esperanto-Kongreso en Bad König en majo kaj dum la Evangelia Foiro en Hannover okazis ekumenaj diservoj. En Aalen okazis ekumena diservo dum la regionaj Ekumenaj Ekleziaj Tagoj kun pastoro Gerrit Berveling kaj pastro Albrecht Kronenberger. Albrecht Kronenberger gvidas ankaŭ regule diservojn en Stuttgart kaj Speyer. Kasistino estas Astrid Hanke. La germana sekcio havis sian jarkunvenon dum la Germana Esperanto-Kongreso.

**NEDERLANDO.** Du fojojn jare mi sendis rondleteron kun informoj al niaj membroj. Pri la laboro de Jacques Tuinder (Evidente) vi estis de tempo al tempo informitaj pere de Dia Regno. Mi estis kaj estas estraranino de Esperanto Nederland. Kasistino estas Gerda Dercks. Nia membro-nombro malgrandiĝis same kiel en multaj aliaj landoj.

**RUSIO.** Larisa Kuzmenko estas ekde multaj jaroj la reprezentantino por Rusio, Belorusio, Ukrainio kaj Kazaĥio. Ŝi sendis mallongan raporton. Kelkaj kristanoj povis renkonti unu la alian dum la Ruslanda Esperanto-Kongreso en Jekaterinburgo en majo.

Meze de decembro okazis renkontiĝo de uralaj esperantistoj kaj kristanoj denove kunvenis. Kiel kutime oni helpis al malriĉuloj. La grupo de Larisa regule kune legas *Dia Regno*-n.

**USONO.** Jerald Veit raportis ke en 2005 KELI havis 6 membrojn sed en 2006 aliĝis 3 novaj membroj. Nia membro Ros' Haruo prizorgas interesan ttt-ejon inter alie kun kristanaj kantoj en Esperanto kun la melodioj (www.geocities.com/cigneto /pretaj.html). La ttt-ejo de Jerald Veit kun bibliaj tekstoj estas



S. KRÜGER, J. TUINDER, Z. SOMHEGYI, B. O. ÅRADSSON

(www.geocities.com/jeraldveit/)

Ambaŭ ttt-paĝoj estas vizitindaj.

**SVEDIO**. La redaktoro de Dia Regno estas ankaŭ la prezidanto de la Sveda Esperanto-Asocio (SEF) kaj la kasisto de la sveda KELI-sekcio. En la kadro de la jarkongreso de la SEF okazis la jarkunveno post mallonga diservo, kiun gvidis Leif Nordenstorm.

Pri la **Ekumena Kongreso** kaj la **Universala Kongreso** mi ne plu raportas. Vi estis informitaj pere de Dia Regno.

Laste: se vi opinias, ke mankas informoj pri la agado de vi, de membroj en via lando, bonvolu informi la redaktoron.

Mi esperas renkonti vin ĉi-jare dum la Kristana Kongreso en Ĉeĥio.

**Estraro de KELI:** inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo:

Philippe COUSSON, prezidanto (2007); vic-prezidanto (vakas); Els van DIJK, sekretario (2007); Siegfried KRÜGER, kasisto (2008); Bengt-Olof ÅRADSSON, redaktoro (2007); membroj: Pavel POLNICKÝ (2008); Zoltán SOMHEGYI (2007); Britta REHM (2008); Irén BAGI (2006); Jacques TUINDER (2007); Samuel GAILLARD (2007).

## Tagordo por la jarkunveno de KELI 2006

1 Malfermo
2 Elekto de kunprotokolantoj
3 Fikso de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Buĝetoj
10 Raporto de la redaktoro
11 Estrarelekto
12 Kongresplanoj
13 Ideoj & sugestoj de la membroj
14 Fermo

### Klarigoj:

(6) Sekvontan jaron mi verkos mian lastan jarraporton ĉar dum la jarkunveno de 2007 mi demisios kaj ne estos reelektebla.

(11) Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de Irén Bagi. Mi nun ankoraŭ ne scias ĉu ŝi estas reelektebla. Laŭstatute devas ĉiun jaron demisii 1/3 de la estraranoj. Se vi pristudas la deĵorperiodojn de la estraranoj je la fino de mia jarraporto, vi rimarkos ke pro diversaj kaŭzoj sekvontan jaron demisios 6 personoj. Tio ne estas saĝa kaj ne ebla laŭ la statutoj. Tial la estraro proponas en la nuna jaro la demision de Bengt Olof Åradsson kaj Zoltán Somhegyi anstataŭ en 2007. Ili ambaŭ estas reelekteblaj.

(12) La 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso okazos inter la 21a–28a de julio 2007 en la urbeto Pelplin, apud Gdansk en Pollando, kune kun la 8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro. La kongresejo estos la Alta Seminario.

Ĉar vi verŝajne jam legis kaj aŭdis pri la neceso trovi novan kasiston kaj sekretarion, mi petis la nunajn kasiston kaj sekretarion priskribi siajn taskojn por ke tiu(j), kiu(j) volontulas pri tiuj taskoj, iom pli bone sciiĝu pri ili. Ne hezitu anonci vin al la nuna deĵoranto por havi pli da informo se vi interesiĝas pri iu tasko!

Redaktoro

## Taskoj de la kasisto de KELI

La kasisto estas estrarano kaj librotenadas la financojn de KELI. Oni rigardu la financan raporton por havi imagon de la laboro. Por enspezoj kaj elspezoj ĉiujare estas ĉirkaŭ 100 kontigoj. Temas pri kotizoj de membroj aŭ abonantoj de *Dia Regno* (DR), la elspezoj por DR kaj la estraranoj kaj enkaj elspezoj por vendataj/aĉetataj libroj.

Nuntempe la kasisto estas ankaŭ matrikulisto kaj gvidas la adresaron de KELI. Necesas partopreni la kongresojn (jarkunvenojn), uzi komputilon por la librotenado kaj por la interreta kontakto. Mi informiĝis per mia antaŭulo kaj volonte helpos posteulon majstri la laboron.

La laboro estas honorofice. Necesajn elspezojn pagas KELI. En KELI-kongresoj la kasisto pagas duonan kongreskotizon.

Siegfried Krüger

## Taskoj de la sekretari(in)o de KELI

1 Li/ŝi estas la ĝenerala poŝtadreso de KELI Tio signifas ke ŝia/lia poŝtadreso kaj elektronika poŝtadreso aperos en diversaj medioj. Inter alie sur la ttt-paĝo de KELI en la interreto, en la jarlibro de U.E.A. (KELI estas kunlaboranta organizo) kaj la adreso estas ĝenerale menciita tie kie ĝi estas internacie bezonata. Sekretari(in)o respondas al demandoj, leteroj kaj se necese direktas la petojn al alia kompetentulo.
2 Verki sekretarian jarraporton
3 Prepari en kunlaboro kun la prezidanto la protokolon por la jarkunveno. Atenti la demisian periodon de la estraro.
4 Mendi salonon por la fakkunsido dum la Universala Kongreso, kontakti la koncernajn personojn pri la fakkunsido kaj diservo kaj serĉado de kunlaborantoj por la fakkunsido kaj diservo.
5 Interkonsiliĝi kun la LKK de la KELI- kaj Ekumena Kongreso pri la propagando por la kongresoj en la esperanto-medioj.
6 Necesas komputilo kaj aliro al la interreto.

Els van Dijk

# Golfpilkoj ..... aŭ: Pri la prioritatoj en la vivo.

Vivohelpo por streĉitaj homoj.

Tradukis el la germana Siegfried KRÜGER, DE

Se la aferoj en la vivo ĉiam pli malfaciliĝas, se 24 horoj po tago ŝajne ne sufiĉas kaj ĉio minacas disrompiĝi super la kapo, tiam povas esti helpema, memorigi la historieton kun la golfpilkoj kaj la biero. Ĉi tie ĝi estas:

Unu tagon profesoro staris antaŭ sia klaso, prenis senvorte tre grandan florpoton kaj komencis plenigi ĝin per golfpilkoj. Li demandis la studentojn, ĉu la poto nun estas plena. Ili jesis.

Poste li prenis sitelon kun silikoŝtonetoj kaj ŝutis ilin en la poton. Li singarde movis la poton kaj la silikoŝtonetoj rulis en la ejon inter la golfpilkoj. Denove li demandis la studentojn, ĉu la poto nun estas plena. Ili konsentis.

Sekvonte li prenis skatolon kun sablo kaj ŝutis ĝin en la poton. Memkompreneble plenigis la sablo la plej malgrandajn restintajn liberejojn. Li ankoraŭfoje demandis la studentojn, ĉu la poto nun estas plena. La studentoj unisone respondis "jes".

La profesoro alportis du ladskatolojn da biero de sub la tablo kaj ŝutis la tutan enhavon en la poton kaj plenigis sekve la lastan ejon inter la sableroj. La studentoj ridis.

"Nun", diris la profesoro, kiam la rido malrapide malpliiĝis, "mi volas, ke vi rigardu ĉi tiun poton kiel reprezentadon de via vivo". "La golfpilkoj estas la plej gravaj aferoj en via vivo: Via familio, viaj infanoj, via saneco, viaj amikoj, viaj konvinkoj; la preferataj, ja la pasiaj aspektoj de via vivo. La silikoŝtonetoj simbolas la aliajn aferojn en la vivo, kiel via laboro, via domo, via aŭto. La sablo estas ĉio alia, la malgravaĵoj".

"Se vi la sablon unue donas en la poton", daŭrigis la profesoro, "estas nek spaco por la silikkoŝtonetoj nek por la golfpilkoj".

"La samo validas por via vivo. Se vi ĉion vian tempon kaj energion investas en malgravaĵojn, vi neniam havos spacon por gravaj aferoj. Ludu kun la infanoj. Prenu tempon por medicina esplorado. Invitu vian partneron por manĝi en restoracio. Engaĝiĝu por viaj konvinkoj - restas ĉiam tempo por purigi la domon aŭ plenumi devojn".

"Atentu unue al la golfpilkoj, la aferoj, kiuj vere estas gravaj. Fiksu viajn prioritatojn. La resto estas nur sablo".

Unu el la studentoj levis la manon kaj intencis scii, kion reprezentas la biero. La profesoro ridetis: "Mi ĝojas pro via demando. Ĝi ekzistas por montri al vi, ke egale, kiel malfacila la vivo estas, ĉiam ankoraŭ restas loko por unu aŭ du bieretoj".

Eble la leganto demandas, kie restas Dio en ĉi tiu parabolo. Ĉu mi ĝuste interpretas, ke la poto simbolas Dion?

## Financa Raporto de KELI 2005 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2004 | 2005 |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | PB-Ĝiro (PB = Postbank NL) | 4.972,75 | 1.958,75 |
| | PB-Rentemeerrekening (2,7%) | 27.500,29 | 32.278,07 |
| | UEA-konto kelk-p | 1.284,00 | 2.354,28 |
| | Kasista kaso | 0,00 | 39,15 |
| | E-Misio, Laiconas | 346,16 | 288,80 |
| | *Monrimedoj* | *34.103,20* | *36.919,05* |
| | Kuranta konto K. Leja | 1.453,99 | 1.497,61 |
| | Postulo el librovendado | | 110,00 |
| | Stokoj (libroj) | 3.151,20 | 2.018,38 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 211,70 | 211,70 |
| | *Provizo* | *4.816,89* | *3.837,69* |
| | Transitaĵoj | 371,29 | 0,00 |
| | **Aktivoj sume** | **39.291,38** | **40.756,74** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 4.291,53 | 5.528,02 |
| | Saldoj negativa/pozitiva | **1.236,49** | **1.142,59** |
| | *Kapitalo entute* | *5.528,02* | *6.670,61* |
| | Dumvivaj membroj | 2.637,11 | 2.573,82 |
| | E-Misio | 8.422,29 | 8.283,15 |
| | Helpa kaso | 2.368,37 | 2.693,37 |
| | Junulara helpa kaso | 337,45 | 337,45 |
| | Kongresa rezerva kaso | 1.891,53 | 1.806,51 |
| | Literatura/Himnara kaso | 12.138,77 | 12.038,77 |
| | Informada/Varbada kaso | 214,72 | 214,72 |
| | Legaco C.P.W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | *Fondusoj entute* | *32.548,04* | *32.485,59* |
| | Pasivo | 570,00 | 629,96 |
| | Kreditoroj | 450,58 | 450,58 |
| | Transitaĵoj | 194,74 | 520,00 |
| | *Pasivoj* | *1.215,32* | *1.600,54* |
| | **Pasivoj sume** | **39.291,38** | **40.756,74** |

## Rezulto 2005 kaj buĝetoj 2005, 2006 kaj 2007 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2005 | Rezulto 2005 | Buĝeto 2006 | Buĝeto 2007 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto kaj sendado de DR | 2.580 | 2.641,00 | 2.700 | 2.800 |
| Perantoj | 20 | 0,00 | 20 | 20 |
| *Revukostoj* | *2.600* | *2.641,00* | *2.720* | *2.820* |
| Prezidanto | 20 | 0 | 20 | 20 |
| Sekretario | 60 | 117,04 | 100 | 110 |
| Redaktoro | 200 | 200,00 | 250 | 250 |
| Kasisto/Matrikulisto | 50 | 43,17 | 50 | 50 |
| *Estrarkostoj* | *330* | *360,21* | *420* | *430* |
| UEA-kotizo | 54 | 55,00 | 55 | 60 |
| Ĉambro de Komerco | 35 | 26,19 | 30 | 30 |
| Kaskontrolo | 40 | 50,70 | 50 | 50 |
| Bankkostoj | 35 | 44,02 | 45 | 45 |
| Merituloj | 30 | 0,00 | 20 | 20 |
| UK Lukostoj | 140 | 0,00 | 140 | 140 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *334* | *175,91* | *340* | *345* |
| Librovendado (kostoj) | 1.200 | 1.339,82 | 1.000 | 1.000 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 50 | 0,00 | 50 | 50 |
| Rabatoj de Perantoj | 30 | 20,80 | 25 | 25 |
| *Aliaj elspezoj* | 1.280 | *1.360,62* | *1.075* | *1.075* |
| **Elspezoj entute** | **4.544** | **4.537,74** | **4.555** | **4.670** |
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 2.850 | 3.049,03 | 2.900 | 2.800 |
| Kotiz- kaj kursdiferencoj | -10 | 5,94 | 10 | 10 |
| Adopta Kaso | 700 | 545,75 | 500 | 450 |
| *Kotizoj entute* | *3.540* | *3.600,72* | *3.410* | *3.260* |
| Librovendado | 1.500 | 1.561,60 | 1.200 | 1.200 |
| Rentumoj | 400 | 518,01 | 500 | 350 |
| Profito el kongreso | 0 | 0,00 | 100 | 0 |
| *Aliaj enspezoj* | *1.900* | *2.079,61* | *1.800* | *1.550* |
| **Enspezoj entute** | **5.440** | **5.680,33** | **5.210** | **4.810** |
| **Saldoj** | **896** | **1.142,59** | **655** | **140** |

## Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2005-12-31

**Aktivoj**

| | |
|---|---|
| Kuranta konto K.Leja: | Repagenda el kredito, antaŭpago kaj pro ŝanĝo de la eldonejo. (repagita je 18.01.2006) |
| Stokoj: | Sanktaj Biblioj (7), Biblio nova NL (34), Biblio nova PL (99), Novaj Testamentoj broŝ. (73), Novaj Testamentoj bind. (29), Evangelioj laŭ Johano (237), Adoru Kantante (9), Nia historio (6), Esperante kaj Ekumene (7), Adoru (16). La libroj estas parte stokataj ĉe Els van Dijk (NL) kaj Jacques Tuinder (NL). La plej granda parto de la Biblioj stokas por ni Bernhard Eichkorn (DE). |
| E-Misio kasedoj: | Dimanĉa koncerto (73). La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston. |
| Postulo: | El librovendado al Usono pagota en 2006 |

**Pasivoj**

| | | |
|---|---|---|
| Kapitalo: | Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj (kursivitaj sube) | |
| Saldo pozitiva: | 1.142,59 EUR | |
| Fondusoj | *Helpa kaso:* Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. Donacoj de Nel v. Iperen (200) kaj la Nederlanda sekcio (200).<br>*E-misio:* La ekzistanta materialo estis transportita de Litovio (E.Laiconas) al Germanio (B. Eichkorn kaj K.H. Schaeffer). Ni modeste subtenis la misian laboron de J. Veit, US.<br>*Literarura Kaso:* Ni aĉetis 10 librojn "Pano por la Animo" el Koreio.<br>*Kongresa rezerva Kaso:* Ni pagis donacojn por LKK en Hungario. | |
| Kreditoroj: | Hungara kaso (Iren Bagi) | 355,33 EUR |
| | Brita kaso (Diana Richardson) | 95,25 EUR |
| Pasivoj: | El ricevo de kongreskotizo kaj abono EK | 629,96 EUR |
| Transitaĵo: | Antaŭricevitaj kotizoj | 520,00 EUR |

## Klarigoj pri la rezulto 2005 kaj la buĝetoj 2006/2007

Kotizoj pagendaj de

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Membroj individuaj | 142 | (146) | Nuraj abonantoj | 28 (25) |
| Membroj familianaj | 10 | (13) | IKUE-abonantoj | 23 (20) |
| Membroj subtenantaj | 2 | (3) | | 51 (45) |
| Membroj dumvivaj | 21 | (24) | | |
| Membroj adoptitaj | 124 | (150) | | |
| | 300 | (333) (antaŭa jaro) | | |

Malkreskas la membraro, grandparte pro maljuniĝo. En la kategorio "Membroj adoptitaj" ni reduktis pro mankanta intereso en Ĉeĥio, Rumanio kaj Latvio. En Hungario 7 nun pagas plenan kotizon. Modeste ni gajnis novajn membrojn kaj abonantojn, sed ne sufiĉe por prosperi.

**Librovendado:** La kostoj aŭ enspezoj por librovendado influas la saldon.

**Adopta Kaso:** Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Jugoslavio, Latvio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2005 enfluis 545,75 EUR.
***Kotizoj:*** hungaraj 60; polaj 23; ĉeĥaj 240; rumanaj 25 EUR.
***Donacoj:*** brita KELI-sekcio 36; finna 93; Unuopaj membroj entute 93 EUR

Saldoj 2005, 2006 kaj 2007: Post la profita kongreso en 2004, propra kompostado kaj sendado de DIA REGNO kaj nova eldonejo en Ĉeĥio nia financa bazo estas bona. En 2007 Bernhard Eichkorn noveldonos la de pastro Albrecht Kronenberger redaktitan Biblion. KELI kontribuos per mendo de 1000 Biblioj.

# Informetoj

La aro da partoprenantoj de nia kongreso kreskis per la subaj personoj:

44. S-ino Jarmila Handlová Ĉeĥio
45. S-ro Pavel Klimeš Ĉeĥio
46. S-ro Miroslav Majerský Ĉeĥio

Nun estas la lasta momento aliĝi al nia kongreso la 12-19an de aŭgusto en Ĉeĥio. Vidu antaŭajn numerojn de Dia Regno por plia informo.

Viktor Vasiljevich Podoljan, kiu jam vizitis kongreson de KELI, serĉas korespondantojn per "normala" poŝto.

Lia adreso:
Central Postbox 77
357601 Essentuki-1
Rusio

---

Kun granda ĝojo ni volas informi ĉiujn niajn KELI-geamikojn, ke ni geedziĝis la 22an de aprilo en la ĝardeno de nia domo en Pázmánd, sude de Budapest. Ĉar pluraj ĉeestantaj gastoj venis el alia lando, la diservo estis plurlingva kaj ni donis la geedziĝan promeson esperant-lingve.


*Bengt Olof Åradsson*
*Ráczkevy Eötvös Ágnes*



---

**Adresŝanĝo:**
La redaktoro, Bengt Olof Åradsson, havos novan adreson ekde la 1-an de julio:

Storgatan 6 A;
S-153 30 Järna;
Svedio
Mobilan tel n-ro +46 70 2004574



## Peter Hayward (1928 - 2006)

Malĝojiga novaĵo al ni en KELI/FBCE estis la forpaso de amata frato kaj samideano Peter Graham Hayward kies morto okazis la 11-an de februaro. Peter estis esperantisto kaj KELI-ano dum pli ol tridek jaroj kaj multe subtenis la kristanan agadon en Esperantio.

Loĝante en Bournemouth, Peter, kun sia edzino Audrey, ankaŭ esperantisto, regule kaj fidele ĉeestis la monatan esperantan Diservon en tiu urbo, kie li volonte gvidis kaj predikis. Peter kaj Audrey kune redaktis la bultenon de nia Brita Sekcio "Kristana Alvoko" dum la jaroj de januaro 1997 ĝis januaro 2002 - dek ses numerojn bele ilustritajn per la lerta artverkado de Peter.

En la paroĥa bulteno de la loka preĝejo, la pastoro skribas,

> *"La vivo de Peter radikiĝis en lia kristana fido. Dum multe da jaroj li gvidis lokan dom-grupon en preĝado kaj Biblia studado, el kiu komenciĝis kaj ankoraŭ daŭras la Paroĥa Preĝ-ĉeno. Li ĉiam estis komplezema kaj zorgema (pri aliaj), neniam plendante pri siaj malfaciloj, kaj ĉiam dankema pro la helpo kiun li ricevis dum siaj lastaj tagoj. Super ĉio, li tiel plene vivis, servante Dion kaj montrante la Dian amon per sia vivo".*

Niaj sinceraj kondolencoj iras al Audrey, fidela edzino, kunulino kaj helpantino al Peter dum dudek kvin jaroj de geedziĝo.

Tom Neil

# Karmemore al Wim Koopmans
## mortinta la 9-an de februaro 2006

Jos Linnebank

el la nederlanda lingvo esperantigis: J. Tuinder
Heemskerk, 29.3.2006

Ĉar jam dum tiom da jaroj
mi vidis tiom da militoj
vidis tiom da konfliktoj
ĉie, en la tuta mondo
vidis uzi tiom da armiloj
tiom da bataliloj.

Tiel ne plu povas kredi mi
je porpacaj armiloj
ne plu povas kredi mi
ke armiloj en estonto
ne ree kaj ree mortigos.

Ho, nepre ne pensu pri mi
ke mi havas alian opinion
ol via koro senespera
ne vidas viajn larmofluojn
ne vidas vian karan landon
per pafado detruitan.
Nepre tion ne pensu pri mi
se mi ne sendas mian edzinon
por dise ĵeti bombojn.

La bonuloj aĉetas armilojn
por servi al la paco
en batalo kontraŭ maliculoj
kaj la maliculoj aĉetas
armilojn nur por mortigi
en batalo pro siaj dioj.
Bonuloj iĝis maliculoj
maliculoj daŭre malamis
kaj maljusteco kaj ruinoj
kaj la tomboj restis...
la armiloj kaj do ankaŭ
la mortigado restis...

Ho, nepre ne pensu pri mi
ke mi havas alian opinion
ol via koro senespera
ne vidas viajn larmofluojn
ne vidas vian karan landon
per pafado detruitan.
Nepre tion ne pensu pri mi
se mi ne sendas mian edzinon
por dise ĵeti bombojn.

Ho, nepre ne pensu pri mi
ke mi estas mola sanktemulo
malkuraĝa, naiva, nerealisma
ke mi absolute ne vidas
kiel tiuj friponoj murdadas
se mi ne petas mian infanon
murdi tiujn mortigantojn.